# De menso al mano

Dokumento por **libera** vizito



# MUZEO DE METIKOMPANIOJ



# Bonvenon !

La muzeo estas fondita en 1968 en la malnova Sankta Juliano abatejo (13ª-18ª jarcentoj). Ĝi ŝirmas riĉan kolekton prezentantan historion, metiojn kaj simbolojn de la Kompanianoj de la Rondiro de Francio.

## Kio estas la metikompanioj ?


Metikompanioj aperas fine de la Mezepoko (15a jarcento). Ili regrupas diversajn asociojn (nomitajn movoj, societoj…) de laboristoj kaj metiistoj de ĉirkaŭ tridek metioj. Iliaj celoj estas la solidareco inter kompanianoj, la profesia perfektiĝo kaj la transdono de moralaj valoroj. Ĉiu estonta kompaniano devas vojaĝi dum pluraj jaroj (Rondiro de Francio), fari kiel eble plej perfektan objejkton (ĉefverkon aŭ akceptolaboraĵon) kaj montri homajn kvalitojn por povi esti integrita en metikompanion dum ceremonio (la Akcepto). Tiam li akceptas metikompanian nomon (ekzemple : *"Tourangeau la Fidélité"*, Turano la Fideleco), unu aŭ kolorojn (rubandojn) kaj marŝbastonon (emblemon de la Rondiro de Francio).
Ekde 2010 metikompanioj estas agnoskataj de la UNESKO kiel nemateria Kultura Heredaĵo de la Homaro.

*Sekvu la direkton de la vizito. Kelkaj el la plej gravaj verkoj estas indikitaj al vi. Por scii pli, detalaj slipoj aŭ paneloj ĉeestas en la diversaj temaj sekcioj de la muzeo.*




# UNUA SALONO

Centre, prestiĝaj ĉefverkoj inter kiuj :
Seruroj kun kaptiloj kaj sekretoj de Emile Ottia, ĉirkaŭ 1860.
Grandaj ĉefverkoj de la kompanianoj tegmentistoj de Turo, 1885.




1 Legendaj originoj de metikompanioj
2 Komparo kun similaj asocioj
3 Historio de metikompanioj

# GRANDA SALONO


Vi eniras en la malnovan dormejon de la monaĥoj de la abatejo. Rimarku la ĉarpentaĵon en formo de ŝelo de renversita ŝipo. Ĝi konsistas el pli ol 12 000 ŝindoj el kaŝtanarbo kaj rekonstruiĝis en la 1950aj jaroj.



## 1. METIKOMPANIOJ HODIAŬ

Ĉi tie prezentiĝas nuntempaj ĉefverkoj (akceptolaboraĵoj), objektoj antaŭnelonge akiritaj aŭ restaŭritaj de la muzeo, temaj nedaŭraj ekspozicioj.

- Eksaltanta delfeno, akceptolaboraĵo de la kompaniano lignaĵisto *"Dauphiné le Coeur Dévoué"*, (Daŭfenio la Koro Sindonema), 1992.
- Nimfea mansako, akceptolaboraĵo de la kompaniano ledaĵisto *"Aunis Coeur Loyal"*, (Aŭniso Koro Lojala), 2010.
- Simbola juvelo, akceptolaboraĵo de la kompaniano juvelisto *"Brabançon Va de Bon Coeur"*, (Brabantano Iras Volonte), 2000.



## 2. JUNGLISTOJ-SELFARISTOJ-ŜURIPARISTOJ-BOTISTOJ

Ili transformas la ledon en jungilarojn, koljungilojn, selojn, seĝotegaĵojn, sakojn, kofrojn, ŝuojn kaj botojn.

- Koljungiloj por ĉevaloj en diversaj dimensioj, 19a-20a jarcentoj.
- Klaŭnŝuoj, far la kompaniano ŝuriparisto-botisto *"Languedoc la Franchise"*, (Langvedoko la Sincereco), 1987.
- Botoj « Napoleono » kaj Garibaldio, far Pierre Capus, *"Albigeois l'Ami des Arts"*, (Albiĝano Amiko de la Artoj), 1850-1860.

## 3. SERURISTOJ–FORĜISTOJ

La seruristoj realigas ĉiujn verkojn el metalo : seruroj, balkonoj, kradoj, portaloj. La forĝistoj okupiĝas pri la ilaraj kaj industriaj laboroj. Ili naskis mekanikistojn.


- Miniatura parkkrado de la kompaniano seruristo *"Léopold le Tourangeau"*, (Léopold la Turano), realigita de 1878 ĝis 1892.
- Movseruro, kun vegetala ornamaĵo, realigita por la konkurso de la Plej Bona Laboristo el Francio en 2011 far la kompaniano seruristo Serge Etienne.




1. Metikompanioj hodiaŭ



2. Junglistoj-Selfaristoj-Ŝuriparistoj-Botistoj



6. Masonistoj-Ŝtontajlistoj-Gipsistoj






18. Metioj de nutraĵo



16. Ŝatokupoj



8. Lignoŝuistoj - Lignaĵistoj - Meblistoj



## 4. HUFOFERISTOJ

Ili realigas la ferojn adaptitajn al la formo de ĉiu ĉevalhufo, al ties uzo, al la korekto de malsanoj kaj misformoj.

- Bukedoj de Sankta-Eloi (ŝildoj) konsistantaj el diversformaj feroj.
- Templo-forĝejo konstituita per feroj far François Bernadet, *“ Toulousain le Bien Aimé”*, (Tuluzano la Plej Amata), 1987.

## 5. TEGMENTISTOJ-ZINKISTOJ-PLUMBISTOJ

Ili protektas la konstruaĵojn kontraŭ la malbona vetero kovrante ilin per ardezoj, tegoloj, zinko kaj aliaj materioj. Ili naskis la plumbistojn.

- Ĉefverkoj el eltranĉita ardezo.
- Granda ĉefverko de Auguste Bonvous memore al sia filo mortinta ĉe Verdun en 1916.



## 6. MASONISTOJ-ŜTONTAJLISTOJ-GIPSISTOJ

Tiuj tri konstrumetioj konstituas malsamajn metikompaniojn.
Ili uzas ŝtonon, cementon kaj ferbetonon, gipson.

- Oblikva ponto el konstruŝtono konstruita laŭ aparta geometrio far *“la Sérénité de Fréville”*, (la Sereneco el Fréville), 1993.
- Muldaĵo de manoj de la kompaniano gipsisto *“La Gaîté de Rochecorbon”*, (La Gajeco el Rochecorbon), 1971.
- Ŝraubforma ŝtuparo de la Domo de Tristan en Turo (15a jarcento), akceptolaboraĵo de la kompaniano masonisto *“Béarnais Coeur Sincère de Pontacq”*, (Bearnano Koro Sincera el Pontacq), 2001.



## 7. BARELISTOJ – BARELTABULISTOJ - ĈARFARISTOJ

La barelistoj uzis hakilon («*la doloire*») por fabriki bareltabuletojn («*les douelles*») antaŭ ilia kunmetado. La ĉarfaristoj fabrikis bestotiratajn veturilojn.
Ili naskis la karoseriistojn.

- Kvin bareletoj kun malsamaj fundoj aŭ sen fundo fare de Victor Patrice *“ Angoumois l’Ami des Arts ”,* (Angulemano Amiko de la Artoj)
- Granda ĉefverko de kompanianoj ĉarfaristoj de Turo fare de Philippe Leroux *“ Tourangeau la Clé des Cœurs ”*, (Turano Ŝlosilo de la Koroj), 1888.



## 8. LIGNOŜUISTOJ - LIGNAĴISTOJ - MEBLISTOJ

La lignoŝuistoj ne plu estas reprezentataj en la metikompanioj, la industrio de ŝuoj kaj botoj el kaŭĉuko malaperigis ilin. La kompanianoj lignaĵistoj realigas pordojn, fenestrojn kaj meblojn.
Meblistoj estas specialistoj pri artmeblaro kaj altvaloraj lignoj.


- Gigantaj lignoŝuoj kunligitaj per la pinto kun skulptitaj simboloj, tute eltiritaj el juglandarba trunko fare de Marcellin Gautier *“ Rennois l’Amour du Travail ”*, (Renano Amo de la Laboro), 1937.
- Glitsuba ŝtuparo fare de Agricol Perdiguier *“Avignonnais la Vertu ”* (Avinjano la Virto), 1825.
- Ebona kaj perlamota tirkestmeblo, Akceptolaboraĵo de *“ Languedoc la Pensée Réfléchie ”* (Langvedoko la Penso Atentema ), 1986.



## 9.ĈARPENTISTOJ

Ili fabrikas subtegmentojn de konstruaĵoj aŭ monumentoj tute el ligno (domoj kun trabar-muroj). Geometriaj desegnaĵoj (nomitaj «*Epures*») realigitaj laŭ la Strekarto antaŭas iliajn verkojn.

- Granda ĉefverko de la kompanianoj ĉarpentistoj de la *“Devoir de Liberté de Tours”* (La Devo de Libereco de Turo), 1869.
- Granda ĉefverko el gluita lamena ligno de la kompaniano Albert Fisseau *“Tourangeau l’Ami du Trait”* (Turano Amiko de la Streko), 1971.
- Geometria desegnaĵo de okangula spajro fare de Victor Auclair, *“ Bourbonnais l’Enfant du Génie ”* (Burbono La Infano de la Genio), 1884.



### 10. LA AKCEPTO KAJ LA DEVO

La Akcepto estas la ceremonio dum kiu aspiranto estas akceptita kiel kompaniano.
La Devo estas aro de reguloj kaj tradicioj specifaj al ĉiu metiasocio.

- Bareliefo de la kompaniano ŝtontajlisto *“La Volonté de Vouvray”* (La Volo de Vouvray) ilustrante la transdonon de la marŝbastono de maljuna al juna kompaniano, 1999.
- “Evangelio de kompaniano”, aro de moralaj preskriboj ; litografo (kaj ties presŝtono), fine de la 19ª jarcento

### 11. LA CAYENNE (prononcu « kajen »)

La Cayenne estas la nomo donita de la metikompanianoj al la sidejo de sia societo kaj al la kunvenejo. Iaj metioj havas « ĉambrojn ».
Antaŭ la dua duono de la 19a jarcento, la sidejoj estis establitaj en gastejoj. La estrino estis titolita « Patrino », ĉar ŝi akceptis kaj prizorgis la junajn vojaĝantojn, kiuj ĵus forlasis sian familion.
Al la *“Rouleur”* (Rulanto) estis komisiita la dungigo de la metikompanianoj ĉe mastroj.

- Portretoj kaj koloroj de la Patrinoj.
- Kofro de kompanianoj ladistoj de Marsejlo, 1778.




### 12. LA LABORO

Zorgemaj transigi sian scion, la kompanianoj kreis artdesegnajn lernejojn (nomitajn « de streko ») pri ĉarpentaĵo, lignaĵarto, ŝtontajlado, poste ili disvolvis profesiajn kursojn por ĉiuj metioj.

- Ekzercoj de metalaj, lignaj, ŝtonaj kunmetadoj.
- « Alfabeto » de kompanianoj ĉarpentistoj(poziciaj markoj sur ĉarpentlignaĵoj).



### 13. LA RONDIRO DE FRANCIO

Pluraj vojaĝjaroj plenumas profesian kaj moralan perfektigon al la metikompaniano. Li portas sian marŝbastonon kaj siajn kolorojn, kies ornamaĵoj kaj materialoj varias laŭ la metisocietoj kaj la epokoj. Ĝis ĉirkaŭ 1850, vojoj de Rondiro de Francio estis la atestanto de interbatiĝoj inter la kompanianoj de malamikaj societoj.
Tiam, konkursoj estis kelkfoje organizitaj por gajni la monopolon de laborlokoj en la «ludita» urbo.

- Bastonoj (19a jarcento) kaj koloroj de nunaj metikompaniaj movadoj.
- Katedroj alnomitaj de Montpeliero : en 1804 *«Gavots»* kaj *«Devoirants»* oponas okaze de unu lignaĵarta konkurso realigante du katedrojn. Tiu de «*Gavots*» (maldekstre) estis konservita, tiu de *«Devoirants»* (dekstre) estis rekonstruita en 2016 de kompanianoj lignaĵistoj anstataŭ la malaperinta originalo.
- Kompaniano de Rondiro de Francio, metalskulptaĵo realigita de Jean Bourreau, hufoferisto : la kompaniano portas sian vestaĵpaketon je la pinto de la marŝbastono, siajn kolorojn kaj sian kalabason…(1978)



## 14-15. FESTOJ KAJ MEMORAĴOJ



Festoj ritmas la vivon de la metikompaniaj movadoj okaze de la akcepto de novaj kompanianoj aŭ de memorfestoj.

- Ceramikaj boteletoj de kompanianoj tanistoj, ĉarpentistoj, hufoferistoj kaj aliaj memoraĵoj faritaj dum la kunvenoj.
- Ŝtuparo kun kvar eniroj fare de la kompaniano ĉarpentisto Marcel Constantin dum sia mallibereco en Germanio dum la dua mondmilito.
- Orelringoj de kompanianoj: la orelringita kompaniano surmetas du orajn ringojn kelkfoje kun pendaĵo, kiu reprezentas la metiilojn.

## 16. ŜATOKUPOJ

Dum sia libertempo, iuj kompanianoj ne hezitas krei verkojn flanke de siaj metioj.

- Burĝo meleagra, tabakpoto, kaj alumetujo el skulptita ligno karikaturante la mastron de kompaniano forĝisto, 1876.
- Ĉaleto de la katoj, birda kaĝo, tramo por likvoroj, marŝipo el konturtranĉita ligno, faritaj de la kompaniano seruristo Leopold Habert, komence de la 20ª jarcento.

## 17. PLEJ BONAJ LABORISTOJ EL FRANCIO

Ekde 1924, nacia konkurso de la Plej bonaj laboristoj el Francio ebligas al multaj kompanianoj obteni tiun titolon en multnombraj metioj. Hodiaŭ ekzistas aliaj konkursoj en kiuj la kompanianoj aŭ kandidatoj partoprenas interalie la Metiaj Olimpiadoj kaj la Mondaj Kompetentecoj *(World Skills).*

- Ĉarpentaĵo farita en 2004 de *"Tourangeau l'Ami du Trait"*, (Turano Amiko de la Streko).
- Torpedo farita en 1927 de la kompaniano selfaristo André Bondet *"Blois va de Bon Coeur"*, (Blois iras Volonte).

## 18. METIOJ DE NUTRAĴO

La metioj de nutraĵo ekzistas en la metikompanioj ekde 1811 (panistoj), kaj kukistoj, kuiristoj kaj porkaĵistoj, ekde la komenco de la 20ª jarcento. Hodiaŭ, troviĝas ankaŭ fromaĝistoj, vinberistoj "Artaj"verkoj prezentataj en la Muzeo ofte kompletigas "gustajn"verkojn pretigitajn por la Akcepto.

- *Les Hospices de Beaune* el pastaĵoj, faritaj en1976 de *"Bouguignon le Disciple de la Sainte-Baume"*, (Burgonjano, disciplo de la Sainte-Baume).
- Granda ĉefverko de la kompaniano kukisto *" Picard la Fidélité"*, (Pikardiano la Fideleco) farita en 1995 por la muzeo.

## 19. KALDRONISTOJ

La kaldronistoj prilaboras kaj kunmetas metalajn envolvaĵojn plejofte por industria sektoro.
Nuntempe, ilia kompetenteco ebligas ankaŭ la realigadon de manfaritaj pecoj.

- Mano tenante sferon, akceptolaboraĵo de la kompaniano kaldronisto *"Provençal la Clef des Cœurs"*, (Provencano Ŝlosilo de la Koroj),1998.
- Latuna cigno, akceptolaboraĵo de la kompaniano kaldronisto *"Ile de France la Constance"*, (Francilio la Konstanteco), 1985.



## 20. MALAPERINTAJ METIKOMPANIOJ

La metiakompanioj evoluas samtempe kiel metioj. Mekanizado kaj industriiĝo malaperigis multajn metiojn: tanistojn, tinkturistojn, teksistojn, ĉapelistojn, ktp…



Iuj metioj evoluis, ĉarfaristoj fariĝis karoseriistoj, aliaj aperis kun la industrio (elektristoj, fabrikistoj-mekanikistoj …)

- Du oleopentraĵoj sur tolo de kompanianoj tinkturistoj de Nanto, ĉirkaŭ 1850.
- Maketaro pri ĉevalmovitaj veturiloj farita de kompanianoj ĉarfaristoj.

## 21. VITRISTOJ- PENTRISTOJ

Kompanianoj vitristoj prilaboras la vitron aŭ pentrante ĝin aŭ kunmetante pecojn de vitro (vitraloj).

- Alegoria vitralo farita de la kompaniano Philippe Audoŭ, alnomita *"Ile de France la philosophie de la Lumière"*, (Francilio, la filozofio pri Lumo).
- Markoj de kompanianoj vitristoj de la 18a jarcento trovitaj sur la katedralo *"Saint-Gatien"* en Turo (muldaĵoj)..

## 22. TEGISTOJ

Tegistoj utiligas teksaĵojn por meblaro kaj garniturojn, kovraĵojn por seĝoj.

- Ĉefajroseĝo *"Sylvie"* akceptolaboraĵo de Jacques Fayolle, 1998



musée du Compagnonnage

8, rue Nationale - 37000 Tours - Tél : 02 47 21 62 20
**www.museecompagnonnage.fr**
museecompagnonnage@ville-tours.fr
@MuseeCompagnonnageTours

VILLE DE TOURS